# *Díaz-Canel vokas labori serene kaj discipline kontra? la nova kronviruso*



Havano, mar 18 (RHK) La kuba prezidento Miguel Díaz-Canel alvokis ?iujn labori serene, senhezite kaj discipline por alfronti sukcese la novan kronviruson, kadre de kunsido pri la evoluo de la agadplano por prevento kaj kontrolo de Covid-19 en la insulo.

Siaflanke, la ministro pri publika sano, José Ángel Portal, informis pri du novaj kazoj pozitivaj al la kronviruso, kiuj aldoni?as al la 5 anta?e konfirmitaj.

La? oficiala komuniko de la ministerio pri publika sano, unu el tiuj du kazoj estas kuba civitano 38-jara, rezidanta en la urbo Camagüey, de tiu centro-orienta provinco. Li revenis de Italio la 14-an de marto;  stabile evoluas ?is nun kaj estas enhospitaligita en tiu urbo.

La alia kazo konfirmita estas kuba civitano 65-jara, rezidanta en Guanabacoa, Havano, kies filino ?us revenis de Italio la 7-an de marto. Tri tagojn poste li eksentis la unuajn simptomojn. Ili vizitis la familian kuraciston la 10-an de marto kaj estis senditaj al la hospitalo de Havano, IPK por studo kaj kontrolo. Entute 6 el la pacientoj pozitive evoluas kaj unu itala civitano restas en grava stato.

La? la retejo de la prezidanteco, nun estas enhospitaligitaj por kontrolo epidemiologia, entute 389 pacientoj, el ili 147 eksterlandanoj kaj 242 kubanoj. Krome, oni atentas en la baza kontrolo sana entute 24 853 personojn en la tuta lando.

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/217060-diaz-canel-vokas-labori-serene-kaj-discipline-kontrau-la-nova-kronviruso

**Radio Habana Cuba**